Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 27an de septembro 2012, per Skype.

(Protokolo aprobita la 1an de novembro 2012.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Ingebjørg Rambjør en Bergen
Mario Machlik en Tromsø
Eli Fitjar en Bergen
Asbjørn Lindh en Oslo, parte partoprenis de punkto 3

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 30an de aŭgusto 2012

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

Kasisto Anne Karin Bondhus raportis pri la Skagen-kontoj:
Skagen vekst: 32588 kr
Skagen høyrente: 61989 kr

3. Kunlaboro pri Lingvo-Kultura Festivalo en Pollando

El Pollando venis invito kunlabori pri projekto, dum kiu. oni i.a. bezonas specimenan lecionon pri la norvega lingvo, kaj prezenton de la norvega kulturo i.a. per partopreno en koncerto. Oni ankaŭ bezonas norvegan tradukon de planita infanlibro.

Mario Machlik kontaktos la respondeculon pri la Festivalo por ekhavi pli da informoj.

4. Seminario

La estraro proponas aranĝi seminarion per Skype en februaro, kun grupoj en la diversaj kluboj. Mario Machlik prezentis ideojn pri la programo.

5. Lernolibro

Anne Karin Bondhus kaj Bjørn Kristiansen Øyen laboris pri tradukado de la lernolibro *Esperanto – la rekta metodo* norvegen (*Esperanto – den direkte metoden*), kaj la provlegado nun preskaŭ finiĝis. Ili private prenas la respondecon por la produktado kaj vendado de la lernolibro.

6. Broŝuroj

a) Ni diskutis eventualan novan faldfolion. Se ni produktos tian, ne temos pri tuja projekto.
b) NEL ĵus eldonis la broŝuron *Oppdag esperanto*, kaj la kasisto sendos fakturon al la subtenantaj kluboj.

7. Landa kongreso

La klubo de Oslo laboradas pri la afero, kaj sendis al ni informojn pri la progreso. Ili faris kelkajn demandojn pri tempo por ekskurso. Jardar Eggesbø Abrahamsen kontaktos Douglas Draper en Oslo pri niaj praktikaj konsiloj kaj demandoj pri tio kaj aliaj detaloj.

8. Eventualaĵoj

a) Lingvojaro 2013: Anne Karin Bondhus esploros, ĉu ekzistas io en la jama programo, kio estos taŭga por NELa partopreno.
b) Abono de interreta konekto en Esperantonia: El Oslo (Esperantonia) venis demandoj pri la kvalito kaj rapideco de nia retkonekto. Anne Karin Bondhus esploros la aferon.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–21:59.
La venonta interkonsiliĝo okazos la 1an de novembro 2012.
Raportis Ingebjørg Rambjør.